



PENSEO

N-ro 314

dec. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



nubo

la leĝereco admirinda
ne tuŝeblas de neelstaruloj.
eĉ se ili havas revajn la flugilojn,
nur eblas rigardi tra fenestro
kaj vei pri sia senpoveco.

densdensa la ŝveba vato
kiel ajn ne povas varmigi la koron
perditan en la poluso suda.
en sonĝoj preskaŭ sentiĝas pluveto
sed tio estas miaj larmoj.
la karesado de nubfloketo
estas ĝuo de aviadilo.



2009-7-18

tondro

muĝe
du nubfloketoj renkontiĝas
hazarde aŭ destine
kaj devas ellasi pasion
senkaŝe.
en tiu ĉi epoko plena de la arto nuda,

pereis kaŝataj amoj.
sed
en la mezaĝo
la forgesita mantirado
eĉ provludiĝas hodiaŭ
tamen sentigas panikon.
kun la okuloj forte fermitaj
ni bremsas tro rapidan korbatadon cis
kurteno.
m-u-ĝ-e,
sen kolizio
la obtuzaj sonoj
ŝtele kuras en propra duonĉielo.
sale konservu la purecon
ĝis eterne.

2009-7-19

fulmoj

apenaŭa rideto.
via okulumo kiel fulmoj
strekas mian ĉielon pluvozan.

mi atendas la kurtenon
ekleviĝi kaj la simfonion soni.

tro longas dek mil jaroj.
via voĉo ankoraŭ ne venas.

fajrero
bruligas necertecon.
via gorĝo ne povas trairi
la distancon kiun la lumondo faras en
sekundo.
kompreneme
mia orelo
ekricevas la klarecon de zefiro.

nebulu ne estas nuboj.
 ĉiuj renkontiĝoj
 estas disigitaj de la serĉlumilo.
 la flagro de alumeto
 malfacile sekviĝas de muĝado.

2009-7-21

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Printempe

Post trinkad' el simfonio
 majesta de Cecília,
 en laŭdo al printempo,
 silentas mi senpene.

Malrapide mi kvietiĝas
 ĉe l' rand' de l' pasintaj sonĝoj,
 nur por aŭdi la pulsadon
 de l' efemereco mia
 (kiel renaskiĝantaj floroj)
 en la rivero de l' vintro
 pilgrimanta, kiu ne pasas.

Juiz de Fora, 22/09/2017.

Thérèse de Lisieux



(1873-1897)

Antaŭ cent dudek jaroj,
 la 30-an de septembro,
 Thérèse de Lisieux,
 nia Sankta Terezino,
 24-jara knabino,
 transloĝiĝis Ĉielen.

Violo el lumo,
 portante la majestan

transcendecon de l' rozo,
 ŝi instruis l' amon al Dio
 per etaj neniaĵoj,
 teksitaj per la parfumo
 de sia simpleco.

Ho, anĝelo feliĉega,
 ankaŭ al ni lernigu
 kompreni kaj akcepti
 nian homecon dian!

Juiz de Fora, 30/09/2017.

Sankta Francisko

En la ĉi-egocentra mondo
 ĉu humileco vereblas?
 Lumo, el la humo de l' tero,
 grandeco de l' maro sub
 la fluej' de l' riveroj?
 Do ni memoru Franciskon,
 La poverello el Asizo.

Juiz de fora, 04/10/2017.

Nepleneco

Kvankam en la dia menso,
 kompleta jam estas mi,
 mia konstruata anim'
 malnet' ankoraŭ fariĝas
 ja en mia nuna tempo.

Skizo el ŝtono kaj lumo,
 ĉiutaga maltrankvil',
 konstruas pacon serĉatan
 ĉe l' poezio de l' vivo.

São Paulo, 15/10/2017.

Paulo Silas (Brazilo)



GASTIGI FATALON

Kretblanka pro surprizo,
 Sed, de l' detru', la nura skizo.

En horizonto, ekleviĝas fumonubo,
 Per kiu, la juĝtag' anoncas amasmurdon.
 La mondregantoj, de sur siaj komandlokoj,
 Ekvidas, de l' homhistori', la epilogon.
 La task' planita por morgaŭa tag' nun vantas
 Sub forta premo de erao forfalanta.
 Vent' orienta fajfas en la stratangulo.
 Insuligita observanto en lumturo
 Konstatas gape, ke la servoj liaj vanas.
 Se, antaŭ tiu katastrofa fino drama,
 Utilas eĉ ne streb' mensstreĉa aŭ multbraka,
 Nenion donus la observ' de ul' senaga.
 La plej timiga parto de terurakonto,
 La plej malhela maro, griza pluvsezono;
 Perforta rabo, perd' plorinda, fulm' kaj
 tondro;
 Pikdrat' karnŝira, kugl' en kapon, militzono;
 Kancerdolor' sur lit', infana larm' sur ĉerko,
 Garantiita pac' per ben' de sangaspergo;
 La atombomb-eksplod' kun ties krudaj sekvoj,
 Rasdefendanta naciism' en reliefo;
 Ne povus tiom da detru' klarigi nete.
 Fatala horo! Bonvenigu ĝin akcepte.



NI KUNORDIGAS

Ene de ni, de nia subjektiveco,
 Ni eltrovis netradukeblan tekston.
 Dum batalo, batal' jarmilojn murdanta,
 La pagana flank' luktis kontraŭ la sankta.
 Subtileco de ag' efektivigita
 Viŝis eblon kunhelpi. Dilem' ekzista!
 Sfinksenigmo, konjekto kaj divenado!
 Ni fortenis alterezoneman tajdon.
 Egoisme, la nia taksad' superis
 Kion, en diskutrond', komunum' alcelis.
 Ni modelis la volon individuan,
 La komencan kaj sekvan, plian kaj pluan.

Eto (Ĉinujo)

Pensero en la Aŭtuno

Someroj floroj
 forglitis kaŝe jam
 kune kun mia am'.

Folioj acerarbaj
 en vent' aŭtuna
 ruĝiĝas je la par'okula.

Saluton jen mi diras
 al la aŭtuna mondo
 sonantan ĝis la horizonto.

Je mia halt' momenta
 ekbatas sonorilo tempa
 kun la muziko bele tembra.

Honteme l' lun' aŭtuna
 kun lotusa aromo en brakum'
 rigardas min kaj l' mondon nun.

Starante sub la lun' aŭtuna,
 mi trovas min en pensa tranco
 kun enokula panorama danco.

Jen kiu semas la lunlumon nun
 en mia sonĝo pri mia perdita amo
 kiu ardegis kiel fajra flamo?

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Verda stelo tradicia



Tradicia verda stelo.
 Verd' fascinas nin per belo;
 simpla signo, sankta moro,
 verda lingvo, pacfervero.

Verda estas la espero,
 verda estu nia Tero.
 Vigle batas nia koro
 kun esper' en kuna horo.

PS: Por la Benedetti-grafikaĵo: Tradicia stelo

MORTA URBO

Nek kukurbo
 plu nek turbo,
 nek perturbo
 per masturbo.

Urbo morta
 kaj sentorta.
 Seneksporta,
 senimporta.
 Urbo morta,
 iam forta,
 nun aĉ-sorta
 kaj senvorta.

Wally Du Temple (Kanado)



Oni Fermis Monahinejon

Apud muro, vindrinkantoj
 Sidas, ebrie parolemaj.
 Parolas la unua,
 “Ĉu vi aŭdis tion?”
 Respondas la dua,
 “Ĉu mi audis kion?”
 “Pro manko oni fermis la monahinejon”
 “Pro manko de kio?”
 “Pro manko de monaĥoj, idioto!”
 “Sed vi diris oni fermis monahinejon.”
 “Monaĥoj finfine alportis pomojn
 de la Fruktoĝardeno, - monahinejon.”
 “Kio okazis al ili?”
 “Serpentoj ilin manĝis.”
 “Ĉu serpentoj manĝis pomojn?”
 “Manĝis monaĥojn kaj monahinojn
 Sed lange, langvore, ame ĉirkaŭvolvis
 sciodezire la pomojn.”

“Tiel serpentoj estos sanktaj, aŭ
 scipovaj?”
 “Mi pensas ke la Kobro iĝos
 Larĝkape Ĉionscia
 Kaj korpe englutos ankaŭ nin.”
 “Poste amiko, kiam mi finpomos
 Po unu, po unu, mi eme poeme pomos
 La vinon.”

Ungeto

Mi vidis
 La novan lunon
 En delikata
 La nove aperanta
 Ungeto
 De mia
 Nepeto



Mori (Usono)



AFORISME (26)

Pri almozetanta infano
 oni skribas kortuŝajn poemojn
 kaj ricevas premiojn
 sed al la malsata infano
 ankoraŭ mankas pano!

Laŭ mia religio
 la senfina unu-verso
 estas Dio,
 la cetero estas
 nenio.

Ne eblas batali
 kontraŭ despotoj

kiujn subtenas
multaj idiotoj.

Vivas pli gaje
almozuloj
ol riĉaj ĵaluzuloj .

Tion, kion saĝuloj
konstruis dum jarcentoj,
dum kelkaj jaroj detruis
malsaĝaj prezidentoj.

Manko de saĝo
kaj racio
estas la ĉefa kaŭzo
de diskriminacio.

Por grandanima persono
estas tro malgranda
la plej alta posteno.

Por esti sukcesa
krom iom da saĝo
necesas ankaŭ
kuraĝo.

Neniam forgesu
perfidulojn
kaj neniam forlasu
fidelulojn.

Kiam malfavoras
politiko
subtenas nin
bona amiko.

Kun amat(-in)'
afabla kaj fidela,
la vivo estas
multe pli bela.

Tie estas malbona lando
kies prizonoj plenas
de malsataj personoj.

Jen mia idealo
pri justo kaj libero:
homo kiel homo estu
bonfarta kaj libera
ĉie sur la tero.

Kiel oni povas ĝui
dolĉan panon
kiam ĉie oni vidas
malsatan infanon!?

Justa,
prospera ,
pacoplena kulturo
estas la plej bona
socia asekuro.

Ne serĉu
perfektan personon
sed en ĉiu homo
trovu bonon.

Idiotoj,
idiotoj,
idiotoj
kaj ankoraŭ idiotoj
respondecas
pri ekzisto de despotoj.



Tiom da akraj pikoj
mi ricevis de fanatikaj
kredantoj de Dio
ke mi mis-pensis; Dio
eble estas skorpio!

Tie ĉiuj prosperas
kie ĉiu persono
firme kredas

je komuna bono.

Tiuj, kiuj kredas
je nenio
ruinigis nian vivon
je la nomo de Dio.

Tiun, kiu flugas
alte en la ĉielo
ĵaluzuloj malaltigas
ĝis sia malalta nivelo.

Homo
kun malicaj okuloj
ne vidas bonon
en bonuloj.

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Neĝas. La tero
sonĝadas oran frukton.
Printemp' alflugis.

✽

Rigard' serĉanta.
Rido en luna nokto.
Ĉarma drogherbo.

✽

Forpasis panjo.
La lucerno lumetas.
Ĝin paĉjo lumigas.

✽

En la ĝardeno
la safranoj ekflavas.
Ekpaŝas printemp'.

Hu Shi (1891-1962)



Floroj en vozo

Ne pro timo al ventblovo kaj pluvbato
nek pro am' al kandellum' kaj incens-fumo
vi nur taksas flor-deŝiranton kun ŝato
ĉar alproksimiĝas li jen per brakumo.

La petaloj falas unu post alia,
ilin bonvolu kolekti sen ignoro,
donacu ilin al karulino via
kiel leteron senvortan el la koro.

elĉinigas **Fangfang (Ĉinujo)**

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKDUA

La ĉielo kaj la tero

§12-08

Konfuceo demandis Laŭzi, dirante:

“Iuj asertas, ke ili sin kulturis laŭ la Taŭo, sed ili fakte agas kontraŭ ĝi. Ili aprobas tion, kio estas neaprobinda, kaj konfirmigas sin al tio, kio estas nekonfirmigebla. La sofisto diris: ‘La malmoleco de blanka ŝtono povas esti apartigita disde ĝia blankeco, kio estas tiel evidenta kiel la fakto, ke la suno kaj la luno pendas en la ĉielo.’ Ĉu tia homo povas esti nomata saĝulo?”

“Tia homo,” diris Laŭzi, “estas kiel eta funkciulo, kiu estas ŝarĝita per siaj devoj. Li lacigas sian korpon per sia metia laboro kaj lasas al la zorgoj ronĝi lian menson. La hundoj, kiuj lertas en ĉasado de vulpoj, malĝojas pro sia ĉeniteco; la simioj, kiuj estas facilmovaj, estas enkaptitaj en la monta arbaro. Lasu al mi diri al vi, Konfuceo, kion vi ne povas aŭdi kaj kion vi ne povas diri. Ekzistas tiel multaj homoj, kiuj havas kapon kaj piedojn sed nek menson, nek orelojn, dum ekzistas preskaŭ

neniu, kies fizika formo povas kunekzisti kun la senforma Taŭo. La moviĝo kaj halto, la vivo kaj morto, la ruiniĝo kaj prosperiĝo, ĉiuj estiĝas per si mem kaj ekster la homa rezonado, kaj tamen, eĉ se estus ia rego super ili, ĝi certe dependus de la homo mem. Forgesi la eksterajn estaĵojn kaj forgesi la naturon signifas forgesi la “memon”. Tiuj, kiuj jam forgesis sian “memon”, povas esti konsiderataj kiel homoj, kiuj identigas sin kun la naturo.”

§12-09

Jiang Lŭmian faris viziton al Ji Che kaj diris:

“La princo de la regno Lu diris al mi: ‘Bonvole donu al mi instruojn.’ Mi ĝentile rifuzis, sed li insistis. Mi diris al li ion, sed mi ne scias, ĉu miaj vortoj estis ĝustaj aŭ ne. Nun lasu al mi ripeti ilin al vi. Mi diris al la princo de Lu: ‘Vi devas esti modesta kaj ŝparema kaj promocii tiujn, kiuj estas justaj kaj lojalaj sen antaŭjuĝo kaj partiece. Se vi agos tiamanere, kiu el la popolo kuraĝos esti malobeema?’”

Aŭdinte tion, Ji Che sin ektordis de ridego kaj diris:

“Tio, kion vi postulas al la imperiestro aŭ reĝo, estas tiel vana, kiel la provo de la manto, kiu levas siajn antaŭajn krurojn en la vojsulko por haltigi la ĉaron. Tiukaze li kvazaŭ alte elmontros tro da bonaĵoj, kiuj altiros sennombrajn aspirantojn!”

Kun granda miro Jiang Lŭmian demandis:

“Konfuzita de viaj vortoj mi vin ne komprenas. Mi esperas, ke vi donos al mi koncizan klarigon.”

“Regante super la mondo,” respondis Ji Che, “la granda saĝulo donas liberecon al la menso de la popolo, por ke la popolanoj povu sin edifi kaj plibonigu siajn morojn, instigas ilin elradikigi siajn malbonajn inklinojn kaj starigi al si aspirojn, kvazaŭ ili farus ĉion el sia denaska naturo, tute sen scii kial. Tiukaze, kiel li devus bezoni respekti la instruojn de la

reĝoj Yao kaj Shun kaj sekvi iliajn paŝojn? Se li volus, ke la popolo havu la virton de la reĝoj Yao kaj Shun, li devus kvietigi la menson de la popolo.”

elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



La surtutoj de bienuloj

el la rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Por manĝi
ŝafon senpage
de Afanti komplotis
bienuloj tromp-age
jen iutage.

Alvenis
ili al lia
kaban' kaj ĥore kriis,
“Venos, kara Afanti,
mondfino fia!

Domaĝe!
Perdiĝos vane
la ŝaf' bredita de vi
penege propramane
kaj akompane.

Hodiaŭ
venas bonkore
ni helpi ĝin formanĝi!
Ni klopodu fervore
por ĝi labore!”

Dirinte,
ili ĵetis sin
sur la ŝafon feroce
kaj kruele buĉis ĝin
al peca ruin'.

Afanti
diris nun, "Bone!
Ĉar la mondĉin' alvenos,
mi bredas nebezone
ĝin furaĝ-done.

Surtutojn
viajn bonvole
demetu antaŭ ĉio
por refreŝiĝi fole
ne plu petole.



Lasu min
prepari en ord'
kaj kuiru l' ŝafaĵon
por via palata mord'
kun ĝu' en komfort'."

Post tio
li por kuiru
fari preparojn tuje
laŭ ilia deziro
ja sen suspiro.

Kaj fakte
li jen kaŝis tuj
la ŝafaĵon, bruligis
la surtutojn sur fajruj'
kun flama ĝojbru'.

Post kiam
ili de ludad'
revenis por la ŝafaĵ',
ili trovis kun malsat'
nenion sur plad',

sed nure
cindron en fajrbrul'
de iliaj surtutoj.
La bienuloj kun hurl'
en duba nebul'

ekkriis
ĥore denove,
"Afanti, kion faris
vi kontraŭ ni ruzkove
kaj stulte bove?"

Bruligis
vi eĉ aŭdace
niajn luksajn surtutojn!
Kiel kruda minace!
Kiel malplaĉe!"

Afanti
diris sen anksi',
"Karaj, morgaŭ tuj venos
mondĉin', ĉu vere ili
utilos al vi?"

Ne risku vian vivon

el la rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Survoje
juĝist' sur ĉeval'
renkontis Afanti kaj
tiu riverencis al
li en jovial'.

Demandis
Afanti sone,
"Kien iras via Moŝt'?"

“Edenen,” li ronrone
diris impone.

“Ĉu volas
iri tien vi,
por ke ni ĝuu kune?”
“Ho, ne,” diris Afanti,
“eĉ se volus iri mi!

Pli bone
ja ankaŭ vi ne!”
“Kial?” ĉuis la juĝist’.
“Vi ja forgesemas tre!
Ĉu vi diris, ke

Alaho
ne grandanime
traktas malbonfarantojn
kiuj venas pilgrime
de malproksime.

Kion vi
faros, tiame
se vi renkontos Lin? Ne
vian vivon fifame
risku sename?”

Yanke (Ĉinujo)

Rideto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Rideto
ludas petole
ĉe ŝiaj lipoj ruĝaj
kaj vangkavoj frivole
belas bonvole.

Rideto
sin kaŝas ame
malantaŭ perlaj dentoj.
Ŝi ridetas tre ĉarme
fajne balzame.

Rideto
ŝia leĝere
ventas tra mian koron,
levas sopiron vere
mian espere.

Rideto
sub la hararo
tiklas mian sentemon
de ama malavaro
trans ajna baro.

**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango *xa,xa,a* (*x=senrima*).

Zhuang Qixiong (Ĉinujo)



Maŭzoleo de Sun Jatsen

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun*

Bela pejzaĝ’
vaste famas
kun brila glor’.
Grandas la hom’
en kruta mont’.
Just’ torentas
jen sen dolor’.
Fontoj lirlas,
nuboj ŝvebas,
rebrilas blanka marmor’.
La floroj,
herboj kaj pinoj,
kun bonodor’!

Ĉu nur egal-valor’,
libero,
frateco en kor’?
Fratoj ne plendu,
viv’ feliĉu,
lando riĉu
por gent-honor’.
Nepre Ĉini’
demokrata

unuecos kun aŭror'!
 Gravuru
 admonon de Sun
 en la memor'!

**Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xxa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)*

Marina Jakovleva

Trezoro kun odoro de fumajita

aringo

Mi malŝatas, kiam plantojn oni nomas kiel herbaĉon.

Ni trinkas ilian sangon, manĝas ilian viandon, vestas nin per ili, varmigas nin forbruligante iliajn ostojn en niaj fornoj, konstruas el ili domojn, faras por oportuneco de niaj pugoj taburetojn... Ni eĉ spiras dank' al plantoj.

Ni vivas dank' al plantoj.

Tial estimu flaŭron, sinjoroj!

Plantoj estas tiaj dankaj... Vi donas al ili pecon de ekskremento kaj taso da akvo, sed oni donas al vi... Ho, ili donas tiel multe, ke oni eĉ ne povas trakalkuli! Ili donas kaj foliojn, kaj florojn, kaj berojn!

Tial al miaj konataj sinjorinoj, kiuj suferas pro nenifrado kaj revas ankoraŭfoje edziniĝi, mi ĉiam konsilas akiri hejme anstataŭ edzo iun agrablan planton. Zorgoj estos pli malmulte, sed utilo estos pli multe! Ne estos nek fiodoro pro alkoholaĵo, nek fiodoraj duonŝtrumpoj, nek insultaĵoj! Mi neniam aŭdis de mia fenestrobreto iujn insultaĵojn. Eĉ se mi verŝis ne tian akvon kaj aĉetis ne tian grundon.

Tial mi neniam rifuzas pliplenigi per ekzotikaj plantoj mian paradizan ĝardenon.

En pasinta somero mia bofratino invitis min por vica funebra manĝo al ĉefurbo de Belorusio. Mia kuzo, kiu havis altan staturon,

belan vizaĝon kaj saĝan menson, frue mortis ne nur pro sia kulpo. En vino anstataŭ vero li trovis nur morton¹. Sed oni entombigis lin inde, kaj jen venis unua datreveno.

Ni veturis al antikva tombejo al kolumbario, hejme rememoris... Poste ni promenis laŭ nokta Minsko, rigardis luman spektaklon – kiel pluredra domo de Belorusa nacia biblioteko en mallumo per diversaj lumoj ĉiel ŝanĝbrilis. Noktaj fontanoj kun multkoloraj lumoj en belorusa ĉefurbo certe ne tiaj grandaj kiel en Barcelono, sed mia amikino, kiu antaŭnelonge estis en Hispanio, diris, ke minskaj fontanoj ankaŭ estas tre belaj, kiam ŝi ekvidis fotojn, kiujn mi faris.

Difektis ĉarman kulturan programon nur bofratino Lubanja, kiu veis pri sia povra kaj ne ordigita virina vivo.

– Mi tiel volas almenaŭ iufoje ekaŭdi karesan vorton! – ŝi veis.

– Kaj aŭskultu! Ja vi havas du grandajn ĉarmajn filinojn. Ĉu ili ne karesas sian panjon?

– Tio estas alia.

– Ĉu vi estas certa, ke via viro diros karesajn vortojn sincere?

– Mi sentos, kiam oni parolas sincere. Ja estas intuicio.

Feliĉe pri fidebla vira ŝultro ŝi ne parolis. Kvankam ŝi agnoskis: jes, en Belorusio viroj, kiuj similas homojn, estas pli multe ol Rusio, sed kaj ĉi tie tiu besto estas tre malofta.

En sekva tago matene Lubanja montris al mi tion, kio kreskas ĉe ŝi sur fenestrobretoj.

– Ĉu tio estas granatarbo?

Tiel al mi ŝajnis post unua rigardo al granda arbeto kun malgrandaj folioj. Ĉe mi unujaraĝa granatarbo preparis sin flori unuafoje.

– Ne!

Lubanja deŝiris unu folion, frotis ĝin en fingroj kaj ŝovis al mi sub nazon.

– Ĉu vi flaras, kiel ĝi odoras? Tio estas mirto. Ĉu vi volas kulturi?

– Mi volas! – kiu rifuzas de planto kun tia agrabla rezina-balzamaodoro?

Bofratino tuj donis al mi malgrandan botelon. En ĝi sidis en akvo negranda branĉeto de mirto jam kun radiketoj.

En buso dum vojaĝo al hejmo mi konstante enrigardis sakon kontrolante, kiel fartas donaco de bofratino, ĉu ĝi estas viva?

Mi pensis pri Lubanja: estus pli bone, se ŝi kulturus florojn ol serĉi porkon de vira sekso. Plantoj almenaŭ ne mensogas kaj ne serĉas profiton. Ŝi perdis dum tiuj serĉoj fortojn kaj sanon. Sed ŝi devas kreskigi du siajn knabinojn. Ili ne baldaŭ iĝos tute memstaraj.

Hejme mi plantis branĉeton de mirto en ia suspektinda universala grundo (niaj urbaj florkulturistoj ne povis diri nenion klaran pri speciala tero por mirto) kaj komencis atendi rezulton samtempe lernante informlibrojn kaj retumante en Interreto. En Interreto mi legis, ke mirto el branĉeto floris post tri aŭ kvin jaroj. Intercetere ĝi kiel citrono ŝatas, ke dum vintro estus freŝe.

Mirto bone kreskis kaj en aŭtuno transformiĝis en ĉarma granda arbeto. Vintre mi lasis ĝin en tiu fenestrobreto, en kiu ĝi kreskis somere.

Sed en unu decembra tago mi kun teruro aperigis, ke folioj de mia mirto komencis serioze defali. Sur fenestrobreto kuŝis multo de verdaj folioj.

Mi transportis poton kun mirto al alia fenestro, kie pasigis vintron citronoj. Tie estis pli freŝe. Ĉiun tagon mi komencis de akvaj proceduroj – mi surŝprucis citronojn kaj mirton, kiun mi alpremis al vitro de fenestro por freŝo.

Mirto daŭrigis faligi foliojn.

Mi ĵetis sin por klarigo de kialoj de malfeliĉo al Interreto. Okazis, ke suferanto-posedantoj de mirto jam demandis pri tio spertulo-florkulturistojn en Interreto-forumoj. Respondo, kiun mi trovis, estis lakona: se mirto faligis foliojn, do estas

du kialoj: aŭ estas multe da akvo, aŭ estas malmulte da akvo...

Sed kia kialo estas: multe aŭ malmulte?



Ilustrajo de Tatjana Homjakova

Tagoj pasis, kaj foje mi komprenis, ke mirto ĉesis faligi foliojn al fenestrobreto. Kvankam kondiĉoj de tenado ne ŝanĝiĝis. Post atenta ekzamenado mi rimarkis, ke defalis nur tiuj folioj, kiuj estis pli apude al trunko. Tial mi suspektis, ke tio estis ne malsano, sed sezona fenomeno, sezona folifalo.

En marto mi decidis transplanti mirton. Mi eligis ĝin el potoj kaj aperigis, ke radikoj eniĝis tra drenajo kaj volviĝis per tri ringoj en fundo. Mi certe subtranĉis ilin kaj samtempe deŝiris malaltan flankan branĉon. Kaj nun mirto iĝis arbeto sur ne alta *ŝtambo*². Ŝtambo estas oportune. Oni povas, kaŝinte poton en maldika polietilena pako, gorgo de kiu estas alligita al trunko, aranĝi duŝon por planto per verŝilo.

En vendejon por nova grundo mi ne iris pro maldiligento, ŝutis al potoj tion, kion mi trovis sub kuvo – universalan grundon de produktado de Nordokcidenta torfa kompanio. Kiam mi akvis, mi miris, kiel multe sorbis akvon tiu muelita torfo. Ĝi sorbis litron da akvo, ĝis kiam sur telero sub potoj akvo aperis.

Post semajno mirto enplantiĝis en nova potoj kaj en nova grundo kaj komencis kreski. Folioj sur novaj branĉoj estis pli grandaj ol la antaŭaj, ilia dimensio estis 4-5 centimetroj de longo. Laŭ informlibroj tiu longo estas maksimuma por folioj de *Myrtus communis*³, kiun oni pli ofte kulturas en ĉambro.

Mi admiris pompon de rapide kreskanta

